



Akademio de Esperanto

Sendependa lingva institucio fondita en 1905

Cirkulero numero 270

Korektita eldono¹ de 2015-10-03

Agado de Akademio de Esperanto en Bonaero kaj Lillo – kaj aliloke

Enhavo

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>
1. Enkonduko	1
2. Membroj 2014–2015	2
3. Korespondantoj	2
4. Estraro	3
5. Sekcioj, komisionoj kaj ties direktoroj	3
6. Lena Karpunina (1963–2013)	3
7. Geraldo Mattos (1931–2014)	3
8. Roterdamo 2014	4
9. Volapuko 2014	4
10. Poznano 2014	4
11. Varsovio 2014	4
12. Montevideo 2014	5
13. Bonaero 2014	5
14. Seulo 2014	8
15. Palestrino 2014	9
16. Feyzin 2014	9
17. Zuriko 2015	9
18. La Chaux-de-Fonds 2015	9
19. Lillo 2015	9
20. Eldona agado dum 2014 kaj 2015	17
21. Projekto pri jarraportoj	19
22. La libroprojekto <i>Aliroj al esperanto</i>	20

1. Enkonduko

Per tiu ĉi cirkulero la estraro de Akademio de Esperanto raportas i.a. pri la aktiveco de nia akademio dum du Universalaj Kongresoj: tiu en Bonaero en 2014 (sekcio 13) kaj tiu en Lillo en 2015 (sekcio 19). Ni memorigos pri du forpasintaj membroj, Lena Karpunina (sekcio 6) kaj Geraldo Mattos (sekcio 7). La sekcioj 8–12, 14–18 kaj 20 raportas pri aliaj okazintaĵoj, kaj sekcioj 21–22 pri planoj.

¹Per tiu eldono la estraro de AdE nuligas la antaŭan version de 2015-09-10.

2. Membroj 2014–2015

Vilmos Benczik	Erich-Dieter Krause	Sergio B. Pokrovskij
Gerrit Berveling	Harri Laine	Otto Prytz
Marek Blahuš	Jouko Lindstedt	Baldur Ragnarsson
Marjorie Boulton	François Lo Jacomo	Ranganayakulu Potturu
Renato Corsetti	Anna Lowenstein	Tsvi Sadan
Marcos Cramer	Ma Young-tae	Saka Tadasi
Probal Dasgupta	Carmel Mallia	Alexander Shlafer
Michel Duc Goninaz	Stano Marček	Humphrey Tonkin
Rudolf Fischer ¹	Geraldo Mattos ²	Usui Hiroyuki
Edmund Grimley-Evans	Aleksandro Melnikov	Amri Wandel
Paul Gubbins	Carlo Minnaja	John C. Wells
Christer Kiselman	Pavel Možajev	Bertilo Wennergren
Boris Kolker	Brian Moon	Yamasaki Seikô
Koutny Ilona	Nguyen Xuan Thu	
Katalin Kováts	Barbara Pietrzak	

Notoj. ¹Rudolf Fischer skribis 2015-04-15: “Mi tial petas vin, akcepti mian eksmembriĝon kaj konfirmi ĝin” kaj en posta letero aldonis “Mi volas min nun koncentri al la finverkado de mia lernolibro *Esperanto en dialogo* por German-lingvanoj kaj tial bezonas liberigon de pliaj funkcioj.” La prezidanto kun granda bedaŭro akceptis lian peton 2015-04-22.

²Geraldo Mattos mortis 2014-03-23. Vidu sektion 7.

Ni konkludas el la notoj ke la nombro de membroj estis sinsekve 43, 42, 41.

3. Korespondantoj

Wael Al-Mahdi ¹	Wim Jansen ^{1,3}	Keyhan Sayadpour Zanjani ¹
Marc Bavant ²	Ingrid Maier ¹	Esther Schor ¹
Detlev Blanke ¹	Mélanie Maradan ²	Sara Maria Rosaria Spanò ²
Joakim Enwall ¹	Veronika Poór ²	José Antonio Vergara Olavarría ²
Sabine Fiedler ¹	A. Giridhar Rao ¹	
Federico Gobbo ¹	Orlando E. Raola ²	

Notoj. ¹Nomumita por la periodo 2013-12-15 — 2022-12-15.

²Nomumita por la periodo 2014-12-15 — 2023-12-15.

³Wim per letero de 2015-09-11 petis liberigon de la posteno de korespondanto de AdE. Kiel klarigon li skribis: “Miaj esploroj pri la eŭskaj lingvo kaj kulturo postulas pli kaj pli da tempo kaj da sindediĉo, kaj mi decidis iom post iom liberiĝi el miaj Esperanto-funkcioj.” La prezidanto kun granda bedaŭro akceptis lian peton la saman tagon. (Wim restos en la Redakta komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies*.)

Ni konkludas el la notoj ke la nombro de korespondantoj estis sinsekve 10, 16, 15.

4. Estraro

Prezidanto: Christer Kiselman. *Vicprezidantoj:* Probal Dasgupta kaj Brian Moon.
Ĝenerala sekretario kaj kasisto: Renato Corsetti. La estraro estis elektita en 2013 kaj ĝia mandato finiĝos en 2016.

5. Sekcioj, komisionoj kaj ties direktoroj

La laboro de Akademio de Esperanto okazas ĉefe en la sekcioj kaj komisionoj. La sep sekcioj, la du komisionoj kaj ties direktoroj estas:

<i>Sekcioj</i>	<i>Direktoroj</i>
Faka lingvo	Sergio Pokrovskij
Gramatiko	Bertilo Wennergren
Ĝenerala vortaro	Marcos Cramer
Lingva Konsultejo	Alexander Shlafer
Literaturo	Paul Gubbins
Prononco	Probal Dasgupta
Kontrolado de lerniloj	Anna Lowenstein
<i>Komisionoj</i>	<i>Direktoroj</i>
Historio de Akademio de Esperanto	Carlo Minnaja
Komisiono pri homaj nomoj	Nguyen Xuan Thu

6. Lena Karpunina (1963–2013)

Lena Karpunina naskiĝis 1963 kaj mortis 2013-11-04. Ŝi estis elektita al nia akademio en la jaro 2010-a. Ŝi aperigis du librojn en esperanto: la novelarojn *La bato* (2001; dua eldono 2006) kaj *Neokazinta amo* (2007). Ambaŭ aperis en la serio *Stafeto*.

Multaj el ŝiaj rakontoj estis premiitaj en Belartaj Konkursoj de UEA. Ŝi kunlaboris kun la Esperanto-revuoj *Monato*, *REGO* kaj kelkaj aliaj. Lena laboris en la Sekcioj Literaturo kaj Konsultejo de nia akademio.

7. Geraldo Mattos (1931–2014)

En la sepa kajero de *Esperantologio / Esperanto Studies* aperis jena notico, verkita de la redaktanto:

“Geraldo Mattos naskiĝis 1931-06-28 kaj mortis 2014-03-23. Li estis membro de la Redakta komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies* ekde la komenco en 1999 kaj ĝis la sesa kajero en 2013. En la unua kajero aperis lia artikolo “Esenco kaj estonteco de la *Fundamento de Esperanto*” (1999:21–37). Mi estas danka pro lia multjara kunlaboro en la revuo. Li mankas al mi.

Geraldo estis poeto, tre grava en la esperanta kulturo. Inter liaj multaj verkoj mi volas aparte mencii lian libron *La deveno de Esperanto* (1987).

Li estis elektita al Akademio de Esperanto en 1970 kaj restis membro dum 44 jaroj ĝis sia morto. Dum la periodo 1998 ĝis 2007 li estis prezidanto. Dum la unua parto de tiu periodo mi estis unu el la du vicprezidantoj. En 2000 ni havis belan tempon kune en Tel-Avivo, kaj ni bone kunlaboris i.a. pri la konferenco en Zagrebo 2001-07-28—30, *Internacia Simpozio pri Lingva Planado kaj Leksikologio*.

Inter multaj memoroj mi menciis ke li diris ke li malŝatas la nazalajn sonojn de la portugala, dum por mi *Atenção!* estas tre ĉarma ekkrio.”

8. Roterdamo 2014

8.1. 2014-05-10: Malferma tago

Invitite de Osmo Buller, direktoro de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio partoprenis en la Malferma tago kvar el niaj membroj, nome Barbara, Brian, Christer kaj Humphrey; kaj kvar el niaj korespondantoj, nome Detlev, Federico, Mélanie kaj Wim.

8.2. 2014-05-11: Kunsido de la estraro de CED

Humphrey prezidis kunsidon de la estraro de Centro de esploro kaj dokumentado pri mondaj lingvaj problemoj (CED). El la membroj ĉeestis, krom Humphrey, Christer; el la korespondantoj ĉeestis tri: Detlev, Federico kaj Wim. Krome ĉeestis Mélanie kaj Veronika, kiuj fariĝis korespondantoj 2014-12-15.

9. Volapuko

Hermann Philipps estas ekde 2014 *cifal* de *Kadem volapüka*. En junio de 2014 la prezidanto de Akademio de Esperanto kontaktis lin. Sekvis tute amikeca interŝanĝo de lingvaj informoj kaj ideoj. Nia korespondanto Detlev publikigis en *Informilo por interlingvistoj* kaj *Interlinguistische Informationen* intervjuon kun Hermann.

10. Poznano 2014

Invitite de Ilona la Universitaton Adam Mickiewicz en Poznano vizitis Christer 2014-07-05. Ŝi informis pri sia multjara agado en la Interlingvistikaj Studoj.

11. Varsovio 2014

Malgrandan muzeon pri la okupaciaj jaroj en Pollando vizitis Christer 2014-07-06. Prezentis la multajn fotojn kaj objektojn tie Bolesław Szenicer, prezidanto de *Gmina Wyznaniowa Starozakonnych w RP*.

Poste Christer iris al la tombo de Zamenhof kaj eniris la novan muzeon pri juda kulturo nomatan *Polin*, kies ĉefa ekspozicio ankoraŭ ne estis preta — ĝin oni malfermis nur kelkajn monatojn pli malfrue.

12. Montevideo 2014

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) organizis konferencon en Montevideo dum ses tagoj, de 2014-07-20 ĝis 2014-07-25. Partoprenis i.a. François kaj Christer (la laste menciita bedaŭrinde nur dum tri tagoj, de la 23-a ĝis la 25-a).

13. Bonaero 2014

13.1. 2014-07-27: Saluto dum la inaŭguro

Dum la inaŭguro la prezidanto sidis sur la scenejo kaj estis petita diri kelkajn vortojn. Jen kion li diris:

“Karaj! Estas granda honoro troviĝi inter vi. Tiu ĉi Universala Kongreso estas mia dudek sesa.

Mi citu nian amatan majstron Ludovikon:

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premataj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, [...] (Respondo de 1914-06-30 al invito partopreni fondon de Hebrea Ligo en Parizo; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1929:344–345.)

Antaŭ cent jaroj kaj dudek sep tagoj li skribis tion. Estis unu monato antaŭ la komenco de la granda milito de 1914–1918. Tiu eldiro estas laŭ mia opinio daŭre tre grava.

Due mi citu mian unuan saluton kiel prezidanto:

Ni estos juĝataj laŭ niaj kulturaj atingoj — nenion pli sekuran ni rajtas atendi.

Esperanto ne estas ĉies dua lingvo, sed ĝi estas lingvo kaj ne nur lingvo: ĝi estas multflanka, multfaceta socia kaj kultura fenomeno.

Mi antaŭĝojas pri multaj interesaj interparoladoj dum la venontaj tagoj. Precipe mi invitas vin al la renkontiĝo marde kaj al la konferenco ĵaŭde.”

13.2. 2014-07-27—08-02: La Internacia Kongresa Universitato

Lekciis ok personoj en la Internacia Kongresa Universitato (IKU), el kiuj unu estas membro de AdE: Marcos. Lekciis ankaŭ Orlando, Sara kaj Veronika. Kiel kutime tri IKU-prelegoj estis parto de AIS-kursoj, nome tiuj de Orlando, Sara kaj Veronika. Tiuj ĉi tri lekciantoj kaj José Antonio tiam ne estis korespondantoj; ili fariĝis korespondantoj kelkajn monatojn pli malfrue.

Nia membro Amri estis IKU-sekretario (persona informo de José Antonio 2015-09-17).² Kiel koncerna estrarano de UEA, la IKU-libron redaktis José Antonio.

²En la IKU-libro oni povas legi ke José Antonio estis IKU-sekretario en 2014.

13.3. 2014-07-27: Renkontiĝo pri nomoj de kemiaj elementoj kun Orlando Raola kaj José Antonio Vergara

Cele al ebla estonta kunlaboro inter AdE, ISAE kaj UEA la prezidanto de AdE alvokis al neformala renkontiĝo kun José Antonio Vergara, prezidanto de ISAE kaj estrarano de UEA, kaj Orlando E. Raola, profesia kemiisto, kiu povus helpi al AdE pri kemiaj nomoj. Orlando tradukis en esperanton tre uzatan lernolibron pri kemio — estas ja ege dezirinde havi tie la nomojn de la kemiaj elementoj en formo kiel plej eble akceptebla. Ĉar en la akademio mankas profesia kemiisto, kaj ĉar Orlando estas unu el la plej kompetentaj personoj pri la fako, lia helpo estus ege bezonata.

La partoprenantoj de tiu ĉi kunsido ĉiuj tri esprimis fortan strebon al kunlaboro kaj interkonsento.

13.4. 2014-07-27: Privata kunsido de la akademianoj

La tradicia privata kunsido de la ĉeestantaj akademianoj okazis dimanĉe, 2014-07-27 16:15–17:00, en salono Sonnenfeld. Partoprenis en ĝi la membroj Barbara, Brian, Christer, François, Katalin, Marcos, Otto (7 el 42) kaj unu korespondanto: Esther (1 el 10).³

Pro la mallonga tempo plej multaj aferoj estis nur rapide menciitaj.

1. Ĉeestantoj proponu ŝanĝojn en la proponita tagordo kaj aldonojn al ĝi. Neniu propono estas menciita.
2. La proponita tagordo estas akceptita.
3. Eventuala *Deka Oficiala Aldono*. Jes, la akademio laboros pri tiu.
4. La laboro pri *Akademia Vortaro*.
5. Aperis
Aktoj de la akademio, 1963–1967 (1967; reeldonita 2007);
Aktoj de la akademio II, 1968–1974 (1976; reeldonita 2007);
Aktoj de la akademio III, 1975–1991 (1992).
 Ĉu ni eldonu novan paperan kajeron, *Aktoj IV, 1992–2013*, aŭ ĉu sufiĉos la rete alireblaj dokumentoj?

La ĉeestantoj unuanime esprimis apogon al la ideo publikigi surpapere *Aktojn* de la mankantaj jaroj, kiuj jam estas sufiĉe multaj.

Sed eĉ pli ambicie: iu proponis ke ni eldonu libron kun ĉiuj *Aktoj*, de 1963 ĝis 2014, en unu sola libro.

6. Verkado fare de Carlo: la historio de la akademio. Menciita kun laŭdo.
7. Verkado fare de Carlo kaj Giorgio Silfer: *Historio de la esperanta literaturo*, prezentita en Budapeŝto 2014-04-23 kaj jam 95 % preta; espereble prespreta antaŭ la jarofino (*Heroldo* 2014, numero 4, 2220, paĝo 3).
8. Libroprojekto iniciatita de la estraro: *Aliroj al esperanto*. Vidu sekcion 22.

³Ekde Fortalezo 2002 (almenaŭ) estas tradicio ke la korespondantoj partoprenas en la privata kunsido de la akademianoj.

9. La laboro en la sekcioj. Pri kelkaj sekcioj oni iomete komentas. La traktado de *ŭ* estas preskaŭ finita; same la problemo pri la du *n* en *Finnlando*. Katalin menciis siajn laborojn.
10. Planado por la renkontiĝo kun la kongresanoj. La propono estas akceptita, kio signifas ke ni faros tiel:
 - (a) Memprezentoj de ĉiuj ĉeestantaj membroj (sidantaj antaŭ la kongresanoj) kaj de ĉiuj ĉeestantaj korespondantoj (sidantaj inter la aliaj kongresanoj).
 - (b) Ni akademianoj demandas la ĉeestantojn: “Kion vi volus ke la akademio faru por vi?”
 - (c) La kongresanoj demandas (parole, sen slipoj) pri aferoj rilataj al la fenomeno esperanto. Sekvas dialogo.

13.5. 2014-07-29: Renkontiĝo kun la kongresanoj

La tradicia renkontiĝo kun la kongresanoj okazis marde, 2014-07-29 12:00–13:30, en salono Frank. La sep membroj kaj la korespondanto jam menciitaj en la subsekcio 13.4 ĉeestis; ĉiu dekomence prezentis sin.

Inter la menciitaj demandoj ni menciis kelkajn:

Dietrich Michael Weidmann menciis ke tre malofte akademianoj partoprenas en la verkado de artikoloj en Vikipedio. Li opiniis ke estus utile havi akademianojn en tiu rolo.

Ekzemplo pri lingva demando aperinta ĉe Vikipedio estas la iam uzata esprimo “popoliniciativo” por laŭkonstitucia proceduro ekigi leĝodonadon fare de ŝtatanoj ekster la parlamento. La ĉeestantoj forte malaprobis la esprimon, opiniante ke *popoliniciato* sufiĉas (*iniciat'* estas Fundamenta radiko; cetere *iniciativo* ja estas analizebla kiel *iniciat-iv-o*).

Iu demandis pri la diferenco inter *tuj* kaj *tuje*. Similaj paroj estas *ĉiom* kaj *ĉiome* kaj kelkaj aliaj.

Ajvo (arjovo@gmail.com) proponis ke la akademio forigu la fonemon /x/ kaj la respondan literon *ĥ*. Klara respondo: tio ne eblas. Sed oni ja rajtas diri *kemio* (OA8), *arkitekturo* (OA8) anstataŭ la Fundamentaj *ĥemio*, *arĥitekturo*. Ŝajne vortoj kun *ĥ* nun fariĝas iom pli oftaj, kio faras ke oni pli ofte povas ekzerci sin.

Aperis demando pri eventuala neŭtrala persona pronomo: *ŝili*, *ri*, *ĝi* kaj memstara uzo de *ge*.

Ĉu la Universalaj Kongresoj estas vere universalaj? Aŭ ĉu pli bone diri “Mondaj Kongresoj”? Ni konstatas ke la atributo *universala* havas longan historion: *Lingwe uniwersala* de 1878; *Lingvo universala* de 1881; la Universalaj Vortaro en la Fundamento 1905; poste okazis multaj Universalaj Kongresoj. Ne estus bone aŭ taŭge forlasi tiun ĉi tradicion.

La demandintoj ricevis inviton komenti la respondojn.

Notinde estas ke la etoso dum tiu ĉi renkontiĝo estis tute afabla kaj amikeca.

13.6. 2014-07-31: Prezento dum la Esperantologia Konferenco

La Esperantologia Konferenco organizita de Esther kaj José Antonio enhavis kvar prezentojn, el kiuj tri rilatas al AdE. Esther prezentis studon sub la titolo “Zamenhof kaj la liberala komunikada debato”; Marcos parolis pri “Ĉu tamen eblas pri-Esperanta lingvoscienco?” kaj Christer faris prezenton kun la titolo “Akademio de Esperanto fronte al novaj taskoj”.

Same kiel 2014-07-29 la etoso estis tute afabla.

13.7. 2014-08-01: Renkontiĝo pri terminologio kun Mélanie Maradan kaj José Antonio Vergara

Cele al ebla estonta kunlaboro inter AdE, ISAE kaj UEA pri terminologio la prezidanto de AdE alvokis al renkontiĝo kun José Antonio Vergara kaj Mélanie Maradan, komisiito de UEA ĉe ISO/TC37 kaj Infoterm; estrarano en Infoterm dum la periodo 2013–2016.

Kvankam ni ne formulis konkretan projekton pri kunlaboro, la partoprenantoj esprimis volon al kunlaboro pri la terminologio, kaj Mélanie ja povus peri valorajn kontaktojn al terminologiaj instancoj.

13.8. 2014-08-02: La fermo

Dum la fermo oni anoncis i.a. premiojn kaj diplomojn, inter kiuj la malsupre menciitaj rilatas al membroj aŭ korespondantoj (la unuaj kvar ricevantoj ne ĉeestis):

- Stano Marček (membro) ricevis la Premion Deguĉi “la Esperantista pacpremio”;
- Marjorie Boulton (membro) ricevis premion de Fondaĵo Grabowski;
- Bertilo Wennergren (membro) ricevis diplomon “pro elstara agado”, “pro kontribuo al la Esperanta rokmuziko”;
- Wim Jansen (korespondanto) ricevis diplomon “pro elstara agado”, “pro la 12-jara gvidado de la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo; kaj
- Christer Kiselman (membro) ricevis diplomon “pro elstara agado”, “pro scienca kaj interlingvistika agado kaj eldonado”.

14. Seulo 2014

Invitite de Korea Esperanto-Asocio (KEA) la prezidanto de AdE partoprenis en renkontiĝo en Seulo 2014-08-17 17:00–21:00. Prezidis la unuan parton de la kunveno Bak Suhyeon (Elstara Park; estrino de la seula filio de KEA). Bonvenigajn mesaĝojn aŭdigis Lee Young-Koo (prezidanto de KEA) kaj Lee Jungkee (estrarano de UEA). La duan parton, kun la prelego de la prezidanto de AdE, prezidis Ma Young-tae (membro de AdE). Ĉeestis ankaŭ Kang Hongu (vicprezidanto de KEA), Hyeonkyeong Min (Minmin; sekretario de KEA), Li Hyon-suk (estrarano de KEA), Park Jong Yeaong (Studema;

estrarano de KEA), Ho Song kaj multaj aliaj. La temo de la prezento estis “Kombineblo de vortelementoj de esperanto”.⁴

15. Palestrino 2014

Invitite de Renato kaj Anna vizitis ilian palestrinan paradizon Christer 2014-09-08—09. Okazis estontecen direktita strategia ideinterŝanĝo inter la ĝenerala sekretario kaj la prezidanto de AdE.

16. Feyzin 2014

Jean-Claude Caraco invitis Christer al sia hejmo en Feyzin 2014-12-20. Li estas elstara interlingvisto kaj esperantologo kaj konas multajn lingvojn, i.a. volapukon kaj la bretonan. Okazis valora interparolo pri lingvaj kaj aliaj aferoj.

17. Zuriko 2015

Dietrich (Didi) Michael Weidmann, en sia funkcio de kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo kaj prezidanto de Esperanto-Societo Zuriko, invitis Christer al renkontiĝo en Zuriko 2015-02-25. Li donacis al tiu ĉi la valoran vortaron *Kleines Wörterbuch Deutsch-Esperanto Esperanto-Deutsch* de Ulrich Matthias kaj Dietrich M. Weidmann (2008).

Didi cetere estas ege aktiva en Vikipedio kaj per tio havas grandan influon al la lingva evoluo. Okazis interesa interparolado pri multaj aferoj kulturaj kaj lingvaj.

18. La Chaux-de-Fonds 2015

Invitite de Giorgio Silber, prezidanto de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, partoprenis du membroj, Carlo kaj Christer, kaj unu korespondanto, Sabine, en internacia kolokvo nomata *Vivanta lingvo de vivanta komunumo*. Ĉiuj tri faris parolan prezenton. La kolokvo daŭris kvar tagojn, de 2015-02-27 (vespere) ĝis 2015-03-02.

19. Lillo 2015

19.1. 2015-07-25: La Movada foiro

Christer, Probal kaj Renato partoprenis en la Movada foiro, kie Akademio de Esperanto havis tablon numero 38 inter 120. Christer kunportis disdoneblan folion kun listo de la membroj kaj korespondantoj, kune kun mallonga prezento de la libroprojekto *Aliroj al esperanto*. Renato alvenis kun alia folio. Tiuj folioj kuŝis sur la tablo, kune kun la tri kajeroj de la *Aktoj*. La lasta kajero kovras la jarojn 1975–1991.

⁴Vidu samtitolan artikolon en *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 7.

Estis amare konstati ke AdE nenion oficialan publikigis surpapere post tiu kajero — pasis dudek kvar jaroj. Tial la bezono je jarraportoj fariĝis pli sentata; vidu sektion 21.

19.2. 2015-07-26: Saluto dum la inaŭguro

La prezidanto salutis la kongresanojn per jenaj vortoj:

“Kara prezidanto Mark; karaj kongresanoj!

Estas granda honoro troviĝi inter vi.

Ni estas en la naskiĝurbo de Gaston Waringhien kaj ne tre for de Bulonjo ĉe maro, la loko de la unua kongreso, kiun Zamenhof nomis ne “universala” sed “internacia”.

Aldone al mia vivo en nia lingva komunumo mi iom sekvas diskutojn kaj konsilojn pri preferinda lingvouzo en la lingvoj sveda, franca kaj angla. En ĉiuj kvar lingvoj ekzistas variantoj — neniel surprize. Ekzistas kanada kaj eŭropa franca; aŭstralia, singapura kaj usona angla; finnlanda kaj sveduja sveda, k.t.p.

Komparante miajn spertojn mi devas konstati ke inter tiuj kvar lingvokomunumoj la esperanta estas maltolerema ĝis aliloke nekonata grado. La “lingvo internacia, kiu prezentus egalrajtan proprajon de la tuta mondo” estas objekto de bataloj kun alikampe nekonataj atakoj.

Ĉu vi povas imagi ke aŭstraliano deklaras ke la usona varianto de la angla lingvo estas malsano? Aŭ ke kebekia francparolanto opinias ke la pariza parolmaniero estas malsano de la franca lingvo? Neniam mi aŭdis ion tian. Sed en esperanto tio okazas. Antaŭ sesdek unu jaroj aperis libro kun la titolo *Du malsanoj en Esperanto*.

Sed tio estis antaŭ sesdek unu jaroj, ĉu mi ne diris? Jes, sed la maltoleremo daŭras. Kiu volas libervole aliĝi al tia komunumo? Mi diris libervole.⁵

Mi antaŭĝojas pri interesaj interparoladoj dum la venontaj tagoj. Precipe mi invitas vin al la renkontiĝo marde kaj al la konferenco ĵaŭde.

La toleremo, la internacieco, la hilelismo kaj la homaranismo de Zamenhof, la sennacieco de Lanti daŭre estu por ni inspiroj. Ni estu feliĉaj ke ni posedas vivantan, kulturan lingvon.”

19.3. 2015-07-26—31: La Internacia Kongresa Universitato

Lekciis dek personoj en la Internacia Kongresa Universitato (IKU), el kiuj unu estas membro de AdE: Amri, kiu ankaŭ servis kiel IKU-sekretario; kaj el kiuj du estas korespondantoj: Federico kaj Orlando. La redaktanto de la IKU-libro estas korespondanto: José Antonio.

Kiel kutime tri IKU-prelegoj estis parto de AIS-kursoj, nome tiuj de Amri, Hannes Larsen kaj Bill M. Mak.

⁵Por iom malhelpi miskomprenojn: la prezidanto ne diris ke AdE ne malrekomendu la uzadon de difinitaj lingvaj esprimoj. Li volis nur diri ke malrekomendo havu la formon: “Akademio de Esperanto malrekomendas uzon de la lingva esprimo *KLMN*” (prefere kun ioma klarigo), kaj ne de la formo: “Akademio de Esperanto opinias ke ĉiu uzanto de la lingva esprimo *KLMN* suferas je malsano.”

Por la unua fojo estis organizita suplemento al la IKU, Scienca Kafejo (2015-07-28 kaj 2015-07-30), en kiu naŭ personoj aperis, inter ili unu membro: Probal.

19.4. 2015-07-26: La privata kunsido de akademianoj

La tradicia privata kunsido de la akademianoj okazis dimanĉe, 2015-05-26 14:15–15:15. La kunsido estis neformala, ĉar laŭstatute neniu formala decido povas esti alprenita. Anstataŭ la kutimaj kvardek kvin minutoj ni ĉi-foje havis sesdek minutojn. Tamen ne eblis ĉion trakti detale. La liston ni uzu kiel atentigon.

Partoprenis el la membroj Amri, Anna, Barbara, Brian, Carlo, Christer, François, Gerrit, Harri, Humphrey, Ilona, Jouko, Katalin, Marek, Otto, Probal kaj Renato, (17 el 41); kaj el la korespondantoj Federico, Giridhar, Keyhan, Marc, Orlando, Sabine kaj Sara (7 el 16).

La ne-partoprenintoj eble volas scii pri la tagordo, al kiu kontribuis nia vicprezidanto Probal. La estraro bonvenigas komentojn de ĉiuj.

1. La prezidanto malfermis la kunsidon.
2. La ĉeestantoj havis eblon proponi ŝanĝojn en la proponita tagordo kaj aldonojn al ĝi. Neniu propono aperis.
3. La propono pri tagordo estis akceptita.
4. Kion Akademio de Esperanto faru? Unu respondo (formala) kompreneble kuŝas en la statuto. Sed tiu ĉi estas bazita sur la konkurenco inter esperanto kaj aliaj planlingvoj, ekzemple ido. Tiu batalo ne plu estas aktuala; sekve la nun aktualaj, veraj taskoj estas aliaj, ĉar temas pri vivanta, kultura lingvo. Imageblaj estas jenaj kategorioj por niaj klopodoj:
 - (A). *Science*. Se labori science, tiam ni ne povas limigi nin al esperanto; necesas pli vasta perspektivo, inkludanta ĉiujn planlingvojn kaj ĉiujn fontolingvojn de esperanto (jido, la rusa, la germana, la pola, la franca, latino, la klasika greka, la angla, k.t.p.); temas sekve pri interlingvistiko. Inter la membroj kaj korespondantoj troviĝas kompetento, sed scienca perspektivo iom kontraŭas la taskon defendi esperanton “kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia.”
 - (B). *Lernade*. Aktiveco pri lernado povas esti pli kompetente traktata de aliaj instancoj, ekzemple ILEI; [edukado.net](#); la amsterdama katedro. Tamen, ni ja povus kontribui per plej diversaj spertoj.
 - (C). *Kontinue* kun la kolektivaj votoj faritaj en Bulonjo ĉe maro en 1905. La laboro pri la *Deka Oficiala Aldono* kaj pri la *Akademia Vortaro* apartenas al tiu kampo de aktiveco.

Sekvis diskuto. Jouko atentigis ke pri (A) kaj (B) aliaj povas kontribui, dum AdE estas sola en la funkcio (C), kiu sekve devus veni unue. Renato samopiniis.⁶

⁶Ili ja pravas. Tamen la demandoj restas, kaj verŝajne daŭre aperados, ĉar Christer ofte aŭdas kaj vidas dezirojn esprimitajn de aliaj personoj je pli da aktiveco rilate al (A) kaj (B). Post la kongreso diskuto pri la prioritataj laboroj de AdE pluiris.

Alia, pli praktika respondo aperas se ni rigardas la sekciojn kaj komisionojn, ĉar tie estas farata la vera laboro. Pri la sep sekcioj, la du komisionoj kaj ties direktoroj vidu sekcion 5.

5. Raportoj pri la laboro en la sekcioj kaj komisionoj. El la naŭ direktoroj ĉeestas nur triono.

Unue Carlo rakontas pri sia verko, la historio de la akademio, prezentota marde en la renkontiĝo kun la kongresanoj. Probal kaj Anna raportas pri siaj sekcioj. Ekzemple la laboro pri la esperantlingva kurso de *Duolingo* (senpaga retejo por lernado de lingvoj) postulis de Anna multe da tempo. Pri la aliaj ses nenio estas dirita.

6. La laboro pri la *Deka Oficiala Aldono*.
7. La laboro pri la *Akademia Vortaro*.
8. Kiel statas la planoj enkonduki voĉdonan sistemon per elektronikaj rimedoj? Renato respondas: “Bone!”⁷
9. La retejo de Akademio de Esperanto. Bertilo ne plu povas okupiĝi pri tiu gravega funkcio; Marek transprenos ĝin.

10. Aperis

Aktoj de la akademio, 1963–1967 (1967; reeldonita 2007);
Aktoj de la akademio II, 1968–1974 (1976; reeldonita 2007);
Aktoj de la akademio III, 1975–1991 (1992).

Ĉu ni eldonu novan paperan kajeron, *Aktoj IV*, aŭ ĉu sufiĉos la rete alireblaj dokumentoj?

En Bonaero 2014 la ĉeestantoj unuanime esprimis apogon al la ideo publikigi surpapere *Aktojn* de la mankantaj jaroj, kiuj jam estas sufiĉe multaj. Sed eĉ pli ambicie: iu proponis ke ni eldonu libron kun ĉiuj *Aktoj* ekde 1963 en unu sola libro. Vidu subsekcion 13.4 kaj komparu kun sekcio 21.⁸

11. Ĉu ni publikigu jarraporton pri nia aktiveco, ekzemple eldonita komence de 2016 kun informo pri la aktiveco dum tri jaroj (2013, 2014 kaj 2015), kaj ne nur de la akademio kaj ties sekcioj kaj komisionoj, sed ankaŭ aktiveco ekster la formala kadro de AdE? Neniu kontraŭis, nek dum la kunsido, nek en la reta diskuto. Vidu sekcion 21.

⁷Poste montriĝis ke Francesco Maurelli estis pretiginta tian sistemon.

⁸Tamen tiu projekto poste montriĝis esti malfacile realigebla. La tri unuaj *Aktoj* estis eldonitaj de la estraro kaj bazitaj sur dokumentoj en ties posedo. Nun la originalaj dokumentoj de 1992 ĝis 2006 troviĝas en la Esperantomuzeo ĉe *Die Österreichische Nationalbibliothek* en Vieno. Kopioj ekzistas en kelkaj lokoj.

En Cirkulero 243, kun dato “2006 10 04” pri la nepublika renkontiĝo en Florenco 2006-07-31 estas skribite ke Carlo “(2) nun havas preskau sufichan datenbazon por la venonta Aktoj IV (tamen mankas ekzemple preciza informo pri aparteneco de la membroj al la tri trionoj)”. Krome estas skribite: “Chiukaze la Komisiono nun posedas chiujn cirkulerojn ekde 1973 ghis nun. // 4. Bertilo Wennergren opinias ke oportuna tempo por la publikigo de Aktoj IV venos kiam la nua Oficiala Aldono estos akceptita.”

12. Informo pri la libroprojekto iniciatita de la estraro: *Aliroj al esperanto*. Pri jam promesitaj ĉapitroj kaj gvidlinioj por la verkado vidu sektion 22.
13. Informo pri la verko de Carlo kaj Giorgio Silfer: *Historio de la esperanta literaturo*, prezentota dum alia programero.
14. Carlo atentigas ke la statuto antaŭvidas disdonadon de premioj “al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj” (artikolo 2). Sed de kie venos la mono? Klara respondo: “Se oni bezonos monon, oni ĉiam povos ĝin trovi.”
15. Planado por la renkontiĝo kun la kongresanoj. En Roterdamo kaj Bonaero la dialogo funkciis tre bone sen slipoj, sed tie ne ĉeestis tre multaj personoj. En Lillo eble la kongresanoj estas tro multnombraj por tiu tre simpla kaj rekta komunikado, tamen ĉial kaj ĉiel preferinda.
Dum la kunsido ĉiuj preferas la uzon de slipoj – tio sekve estas la decido. Vidu subsektion 19.7.
16. La laboro pri nova statuto, inklude peton pri plena (ne nur limigita) jura personeco en Nederlando.
17. La prezidanto fermis la privatan kunsidon.

19.5. 2015-07-26: La Nacia vespero: transdono de diplomego al Naturamiko

La Nacia vespero estis laŭ Christer nekutime altkvalita. Ĝi havis la rubrikon “Brel inter la gigantoj” honore al Jacques Brel (1929–1978).

La prezidanto de AdE estis invitita fare de Marcel Redoulez saluti sursceneje 4,3 metrojn altan giganton kaj transdoni al tiu ĉi diplomegon en formato de 100 cm × 75 cm. La giganto estis nomata Naturamiko kaj originis el la tradicio de la tieaj karnavaloj kaj lokaj festoj.

La prezidanto transdonis la diplomegon kun kelkaj vortoj, proksimume tiuj ĉi:

“Kara Naturamiko; karaj kunlaborantoj de Naturamiko!

Mi tre ĝojas ke mi havas okazon renkonti vin. Eĉ pli mi estas feliĉa ke vi estas naturamiko kaj ne naturmalamiko! Imagu se estaĵo kiel vi estus naturmalamiko! Ĉiuj kiuj estas naturmalamikoj, levu la manon! [Neniu faras.] Vi vidas ke vi ne estas sola.

Nur unu averton mi havas: ju pli alta oni estas, des pli severe, des pli danĝere, estas fali. Tre atentu ke vi ne falas. Mi deziras al vi longan, feliĉan vivon sen ajna falo.

Pro viaj gravaj kontribuajoj al nia lingvo kaj al la esperanta kulturo – laŭ mi plej grava parto de nia komunumo – Akademio de Esperanto decidis doni al vi diplomegon kiel ateston pri via alta lingva kaj kultura nivelo. [Li legas la tekston de la diplomego.]

Nun restas al mi nur unu problemo: kiel efektive transdoni ĝin? Tio okazos helpe de fizikaj rimedoj.” [Marcel estis preparinta stangon per kiu la prezidanto kun granda fortostreĉo sukcesis pendigi la diplomegon sur la brakon de Naturamiko, kiu estis ... altnivela].

19.6. 2015-07-28: Inaŭguro de memortabulo ĉe la enirejo de la naskiĝdomo de Gaston Waringhien

2015-07-28 11:00, marde, okazis renkontiĝo ĉe la naskiĝdomo de Gaston Waringhien (8 place Philippe-Lebon). Parolis Xavier Dewidehem, prezidanto de la LKK; Mark Fettes, prezidanto de UEA; kaj Christer, prezidanto de AdE. Christer ne havis skribitan tekston kaj tial nun ne povas redoni ekzakte kion li diris, sed li aŭdigis almenaŭ jenon:

“Karaj kongresanoj!

Estas signifoplena momento en nia historio. En tiu ĉi domo naskiĝis antaŭ 114 jaroj Gaston Waringhien, kiu estis post Zamenhof mem nia plej grava verkisto, poeto kaj esperantologo.

Inter liaj multaj verkoj mi aparte menciis la signifon de *Plena analiza gramatiko*, verkita kunlabore kun Kálmán Kalocsay, kiun mi plene tralegis tuj kiam mi komencis interesiĝi pri la lingvo. Eĉ pli grava por mi estis lia verko *Lingvo kaj vivo*, kiu rakontas ne nur pri *Lingvo internacia* de 1887, sed ankaŭ pri *Lingve uniwersala* de 1878 kaj *Lingvo uniwersala* de 1881. Tiuj lingvoj — aŭ variantoj de lingvoj — estas ege gravaj se oni volas kompreni esperanton de 1887. Ili estas geografie ligitaj al la urboj Bjalistoko, Moskvo kaj Varsovio.

Kiam mi estis elektita al la akademio, Gaston Waringhien jam estis forlasinta la prezidantecon. Mi ne ĉeestis la tagon en Stokholmo 1980 kiam li venis tien, sed mi korespondis kun li kaj konservas lian afablajn, klarigajn leterojn.

[Poste li transiris al la franca:] Mesdames, messieurs, ...”

Mark kaj Christer fortiris la flagon kiu kovris *la plaque commémorative*, la memortabulon, kies teksto estas

Dans cette maison est né le 29 juillet 1901

GASTON WARINGHIEN

(1901-1991)

Grammarien et traducteur,

héraut de la langue internationale *Espéranto*,

auteur du dictionnaire mondial

PLENA ILUSTRITA VORTARO.

A contribué au rayonnement

de la culture française.

19.7. 2015-07-28: Renkontiĝo kun la kongresanoj

La renkontiĝo okazis 2015-07-28 15:30–17:00, marde. La salono Bakker estis plena. El la membroj ĉeestis Amri, Anna, Barbara, Brian, Carlo, Christer, François, Gerrit, Harri, Hiroyuki, Humphrey, Ilona, Jouko, Katalin, Marek, Otto, Probal, Renato kaj Stano (19 el 41); el la korespondantoj Detlev, Federico, Giridhar, Keyhan, Marc, Orlando, Sabine kaj Sara (8 el 16).

La prezidanto proponis la saman sinsekvon kiel en Roterdamo 2014-05-10 kaj en Bonaero 2014-07-29 — kun aldono (punkto 2).

1. Rapida memprezentoj de ĉiuj ĉeestantaj membroj (sidantaj antaŭ la kongresanoj) kaj de ĉiuj ĉeestantaj korespondantoj (sidantaj inter la aliaj kongresanoj). Du-tri frazoj por ĉiu, diris nia ĝenerala sekretario Renato. La prezidanto komencis per: “Mi estas matematikisto, kiu parolas la svedan, esperanton, la anglan kaj la francan. Mi redaktas la revuon *Esperantologio / Esperanto Studies*, kies sepa kajero ĵus aperis.” Sekvis Probal, Brian, Renato kaj ĉiuj aliaj membroj kaj korespondantoj.
2. Carlo prezentis sian verkatan libron pri la historio de Akademio de Esperanto.
3. Ni akademianoj demandis la ĉeestantojn: “Kion vi volus ke la akademio faru por vi?”
4. La kongresanoj demandis per slipoj pri aferoj rilataj al la fenomeno esperanto.
5. La demandintoj ricevu inviton komenti la respondojn. Devus sekvi dialogo. Tamen tio ne okazis.

Christer kolektis dek tri slipojn post la renkontiĝo.⁹

1. Ĉu kuracisto diru: “Manĝu” aŭ “Prenu” aŭ “Glutu” unu pilolon ĉiutage? Allan Simon KN 137. Stano respondis.
2. Kiu estas la plej lastatempaj pensoj/decidoj pri landaj nomoj, ekzemple Barato, Bharato, Hinda Unio? Probal respondis.
3. Ĉu la formoj *konversi* (por *konversacii*), *koruso* (por *ĥoro*) kaj *meteologio* (por *meteorologio*) estas laŭnorme uzeblaj? Probal respondis — kun eta aldono fare de Christer pri meteorologio (en la franca oni ofte diras “la météo”, kaj li opinias *meteologio* francismo).
4. Ĉu la Akademio estas preta (kaj kuraĝa) iam deklari la akuzativon ne plu deviga? Christer respondis (nee).
5. Ĉu plu necesas referencadi al iu arkaika, mucida Fundamento? KN 813 (= István Ertl). Christer respondis; Brian daŭrigis.
6. Ĉu AdE konsideras malfermi paĝon ĉe *Facebook*? Christer respondis (nee), sed poste aldonis ion pri la Konsultejo, kiu estas nia plej aktiva kontakto kun la esperantoparolantoj.
7. Ĉu esperantoparolantoj estas pli kverelemaj pri lingva diverseco ol aliaj popoloj? Ne respondita.
8. Ĉu ĝustas “mi sinduŝas” (du vortoj)? Christer kaj Otto respondis.
9. Kiam ni rajtos oficiale uzi na “ri”? Anna respondis ĝin samtempe kun la sekvanta.

⁹Ĉi tie eblas mencii nur la demandojn, ne la respondojn.

10. Kia estas la opinio de Akademio pri uzo de aldona neŭtrala pronomo “ri” aŭ “ŝli”, kaj kiu el tiuj du formoj estas/estus preferinda? Se ne kiel pronomo, kiel aldona vorto. Anna respondis.
11. Ĉu *kompufono* aŭ *smartfono* por poŝtelefono kun interreto? Renato respondis; Brian atentigis ke vortfandaĵoj kiel *kompufono* estas nekutimaj strukturoj en nia lingvo; Christer referencis al respondo de Jouko en 2013.
12. “Ĉi-somere mi vizitos la universalan kongreson de Lillo.” “Ĉu ĉi-kongreso estas granda aŭ malgranda evento en Lillo?” Ĉu ĉi-frazoj ĝustas? Ĉu io ŝokas la akademianojn? Ilona respondis.
13. Kiel nomi en esperanto la lignon de la arbo *Brosimum guianense*, ankaŭ nomata *Piratinera guianensis*? En la angla *snakewood*.¹⁰ Demandis Andreo Marshall, KN 782. Brian respondis. Christer deklaris ke ni, parolantoj de Lingvo internacia, devus respekti aliajn internaciecojn, ekzemple la konvenciojn pri botanikaj kaj zoologiaj nomoj. La logiko estas simpla: se ni malrespektas aliajn, funkciantajn internaciecojn, kiel ni povas atendi ke aliaj respektas nian Lingvon internacian?¹¹

El tiuj ĉi dek tri eble la respondo de Anna al demandoj 9 kaj 10 estus interesa por plua konsidero. Sabine ja verkis pri la temo.

19.8. 2015-07-29: Ekskurso al Bulonjo ĉe maro

La ekskursan tagon, merkrede, pluraj akademianoj veturis per buso al Bulonjo ĉe maro, kie la ekskursantoj renkontiĝis en la teatro, ĝuste en tiu en kiu la kongreso de 1905 okazis. Brian voĉlegis tie la tutan paroladon de Zamenhof en 1905.

Poste ni paradis tra la stratoj ĝis la stacidomo, kie memortabulo estis malkovrita — ĝi memorigas pri tiu kongreso, kiu “kunigis 688 partoprenantojn el 20 landoj”; kaj daŭrigis ĝis la urbodomo, kie ni estis bonvenigitaj de la urbestro Frédéric Cuvillier. Multaj paroladoj . . . Christer (tute mallaŭte) proponis ke oni ŝovu kelkajn paroladojn al la jubileo de 2105.

La esperanta flago estis pinte sur la turo kaj en pluraj aliaj lokoj.

Poste Christer faris krom-ekskurson al Wimereux, kie li estis invitita prelegi en kolokvo honore al Pierre Lelong (1912–2011) en 1981, antaŭ nur 34 jaroj.

19.9. 2015-07-30: La Esperantologia Konferenco

La ĉi-jara Esperantologia Konferenco, organizita fare de Orlando (korespondanto), okazis ĵaŭde 09:00–13:00 en salono Bakker, sekvata de montrado de afiŝoj en la halo

¹⁰Tamen, laŭ la anglalingva Wikipedia: “Snakewood is a common name of several different plants: *Acacia xiphophylla* (family Fabaceae) in Australia; *Brosimum guianense* (= *Piratinera guianensis*) (family Moraceae) in South America, an exotic hardwood prized for its highly figured grain; *Colubrina species* (family Rhamnaceae) in North America; *Condalia species* (family Rhamnaceae).”

¹¹Oni povas pensi ankaŭ pri la ISO-normoj por mallongigoj de lingvonomoj kaj landnomoj. Pri mallongigoj de lingvonomoj vidu cirkuleron 105, 1972-11-30, kie Gaston Waringhien skribas: “estus eble utile, se la Akademio rekomendus unuecigon de tiuj mallongigoj sur la bazo de la ISO-rekomendoj.”

Enderby. Tiaj afiŝoj estas ofta afero en plej diversaj sciencaj konferencoj, sed en tiu ĉi kunteksto ili estis nova iniciato de Orlando. (Kelkaj estis anonimaj. Malbone.)

Kiel estrarano de CED Christer havas la taskon certigi ke esperantologiaj konferencoj okazos, sed li ne mem devas organizi ilin. Ĉi-jare Orlando faris la laboron — kaj sukcesis kunlaborigi pinte altkvalitan teamon: Věra Barandovská-Frank, Detlev Blanke (korespondanto), Probal Dasgupta (membro), Federico Gobbo (korespondanto), Gotoo Hitosi, Humphrey Tonkin (membro), Usui Hiroyuki (membro).

Universala Kongreso estas unika okazo por plani venontan Esperantologian Konferencon. Ĉi-foje Christer sukcesis por la konferenco okazonta en Nitro varbi kunlaborontojn: Orlandon kaj Saran (ankaŭ ŝi estas korespondanto).

19.10. 2015-07-30: Publika CED-kunsido

Vidu estontan protokolon de CED.

Christer menciis malveran aserton en libro verkita de Walter Ŝelazny.

19.11. 2015-07-30: Akcepto en la urbodomo

Pluraj membroj kaj korespondantoj estis invititaj al akcepto ĉe la urbodomo de Lillo 2015-07-30 ekde 18:00.

19.12. 2015-07-31: Kunsido de la estraro de CED

Humphrey prezidis kunsidon de CED 2015-07-31 12:30–13:30. Ĉeestis krom Humphrey el la membroj de AdE Christer; el la korespondantoj de AdE ĉeestis kvar: Detlev, Federico, Giridhar kaj Sabine. Vidu estontan protokolon de CED.

19.13. 2015-08-01: La fermo

Dum la fermo oni disdonis i.a. dek diplomojn pro elstara agado kaj du pro elstara arta agado. Inter la ricevintoj unu estas membro de AdE: Ilona Koutny, kiu ricevis diplomon pro elstara agado kaj pro la gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano.

20. Eldona agado dum 2014 kaj 2015

Membroj kaj korespondantoj de AdE multe verkas, publikigas kaj redaktas. Ni menciis ĉi tie ekzemplojn, sed nur el la 21-monata periodo de 2014-01 ĝis 2015-09. Tio signifas ke ne estas menciitaj multaj publikigaĵoj el 2013, same kiel publikigaĵoj jam konataj kaj aperontaj en oktobro 2015 aŭ poste.

Eĉ por la menciita 21-monata periodo la listo ne estas elĉerpa. Espereble la raporto menciita en sekcio 21, kiu kovros la 36-monatan periodon de 2013-01 ĝis 2015-12, estos pli kompleta kaj enhavos bibliografiajn donitaĵojn. Kvankam nekompleta, la sekva listo tamen montras al granda agado.

- Gerrit Berveling publikigis en 2014 *Antologio Latina 5, Frua Kristanismo*, libron aperintan en longa serio da similaj verkoj. Li publikigis en 2014 du artikolojn en *Literatura Foiro* kaj en 2015 unu poemon tie. Li estas redaktoro pri spirita vivo de *Monato*.
- Renato Corsetti publikigis en *Language Problems & Language Planning* du recenzojn (2014, 2015).
- Probal Dasgupta publikigis en 2015 studon pri la plenvorta morfologio. En *Beletra Almanako* (2015) li aperigis tradukon de priesperanta kaj prilingvaj poemoj de baratdevena usona verkisto, kiel specimenon de fremdula esperantologio. En la bengala lingvo li aperigis esearon kiu metas Esperanton sur la ĝeneralan intelektan tagordon en kaj ekster la lingvistiko, *Merur prarthona: bishuber uttor* 'La polusoj preĝas: la ekvatoro respondas' (2015).
- Edmund Grimley Evans estas redaktoro pri komputado en *Monato*.
- Paul Gubbins estas ĉefredaktoro de *Monato*. Li publikigis en 2014 anglalingvan romanon *Westminster Blues*.
- Christer Kiselman redaktas *Esperantologio / Esperanto Studies*, kies sepa kajero aperis en 2015. Dum la periodo li publikigis unu artikolon en esperanto pri esperantologio kaj kvar matematikajn artikolojn, el kiuj unu estas en esperanto kaj tri en la angla. Krome li publikigis dum la periodo sep malgrandajn artikolojn pri diversaj temoj, el kiu unu estas en esperanto, kvar en la sveda kaj du en la angla.
- Boris Kolker publikigis en 2015 referaĵon de sia ruslingva doktora disertaĵo el 1985 pri la influo de la rusa lingvo al la evoluo de esperanto. Li estas redaktoro pri libroj en *Monato*.
- Koutny Ilona publikigis en 2015 artikolon en *Interdisciplinary Description of Complex Systems*.
- Aleksandro S. Melnikov publikigis en 2015 *Gvidlibron tra Esperantio*, Rostov-na-Donu.
- Carlo Minnaja publikigis en kunlaboro kun Giorgio Silfer la libron *Historio de la esperanta literaturo*, menciitan en subsekcio 19.4. Li estis ĉefredaktoro *Literatura Foiro* dum la jaro 2014 kaj publikigis en tiu revuo multajn artikolojn.
- Sergio B. Pokrovskij publikigis artikolojn en *La Ondo de Esperanto* en 2014, aperinta ankaŭ en *Lingva Kritiko* (2014). Li aperigis samjare en *Lingva kritiko* artikolojn pri nombrosistemoj kaj pri duonvokaloj kaj diftongoj.
- Otto Prytz publikigis en 2014 artikolon pri la romano *Nebulo* en *Literatura Foiro*.
- Baldur Ragnarsson publikigis en 2014 plurajn poemojn en *Literatura Foiro*.
- Tsvi Sadan publikigis en 2014 studon pri la hebrea en *Oxford Bibliographies in Jewish Studies* kaj en 2015 samloke studon pri Zamenhof.
- Alexander Shlafer publikigis rezultojn el la Konsultejo en *Ondo de Esperanto*.
- Humphrey Tonkin publikigis en 2014 artikolon en *Literatura Foiro* pri On Kawara. Li redaktis kune kun Veronika numeron de *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), kaj publikigis artikolon tie.
- Usui Hiroyuki publikigis en 2015 studon pri pra-sennaciismo en oriento.
- Amri Wandel publikigis en 2015 kvin sciencajn artikolojn pri astronomio kaj unu artikolon en *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (2015).
- Bertilo Wennergren estas ĉefredaktoro de *Lingva Kritiko*.

Marc Bavant doktoriĝis en 2014 pri ĝenerala lingvoscienco. Samjare lia doktora disertaĵo aperis: *Résultatif, diathèse et possession en basque, vieux perse et élamite*.

Detlev Blanke dum multaj jaroj publikigas *Informilo por interlingvistoj* (IpI) kaj *Interlinguistische Informationen* (IntI). Li aperigis artikolon en *Beiheft 21* (2014) de *Interlinguistische Informationen* kaj samjare artikolon pri André Martinet en *La Ondo de Esperanto*. En 2015 li publikigis studon pri esperantologiaj publikaĵoj kaj du artikolojn en *Interdisciplinary Description of Complex Systems* en 2015, el kiu unu estas en kunlaboro kun Wera Blanke.

Joakim Enwall publikigis en 2014 du libroĉapitrojn en la angla: unu pri la skribsistemoj de la miaŭ-a popolo en sudokcidenta Ĉinujo kaj duan pri lingvoj de malplimultoj en Ĉinujo.

Sabine Fiedler publikigis en 2014 germanlingvan libron pri frazeologiaj anglismoj en la germana. Ŝi redaktis kune kun Cyril Brosch *Beiheft 21* (2014) de *Interlinguistische Informationen* kaj aperigis enkondukon kaj artikolon pri genroindikoj tie. En kunlaboro ŝi eldonis oftecvortaron de esperanto (2014). Ŝi estas redaktoro pri interlingvistiko en *Language Problems & Language Planning* kaj en 2015 publikigis artikolon tie. En 2015 ŝi publikigis du libroĉapitrojn en la angla. En *Literatura Foiro* kaj *Interdisciplinary Description of Complex Systems* ŝi publikigis po unu artikolon pri frazeologio (2015).

Federico Gobbo estas unu el du redaktoroj pri recenzoj en *Language Problems & Language Planning* kaj en 2014 publikigis artikolon kaj recenzon tie. En *Interdisciplinary Description of Complex Systems* li publikigis artikolon (2015).

Wim Jansen publikigis en 2015 du studojn pri la Funkcia Diskurs-Gramatiko, el kiuj unu estis en esperanto, la alia en la angla. La laste menciita aperis en *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (2015).

Ingrid Maier publikigis dum la periodo dek artikolojn kaj unu libron, kelkajn kunlabore. La lingvoj estas la rusa, germana, angla kaj sveda.

Veronika Poór redaktis kune kun Humphrey numeron de *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2).

Sara Spanò publikigis en 2014 recenzon en *Literatura Foiro* kaj en 2015 du recenzojn tie.

José Antonio Vergara redaktis dum 2014 kaj 2015 kun Christer la libreton pri la Esperantologia konferenco en Rejkjaviko. Li estas unu el la redaktistoj de la revuo *Scienca Revuo*.

21. Projekto pri jarraportoj

Dum la Movada foiro sabatvespere 2015-07-25 estis ege klare ke Akademio de Esperanto havas malmultajn surpaperajn publikigaĵojn: la lasta estas *Aktoj III*, kovranta la jarojn 1975–1991. I.a. tial aperis la ideo pri jaraj raportoj.

La estraro proponas ke AdE eldonos jaran raporton en 2017 por la jaro 2016; en 2018 por la jaro 2017 k.t.p. Sed ĉar tia raporto ne estis farita antaŭe, la estraro proponas ke la unua raporto aperu en 2016 kaj kovru tri jarojn: 2013, 2014 kaj 2015.

Tiu publikigaĵo kompreneble raportu pri la aktiveco de la akademio kaj ties sekcioj kaj komisionoj. Sed ne nur: ĝi raportu ankaŭ pri la aktiveco de ĉiu membro kaj ĉiu korespondanto ankaŭ ekster la formala kadro de AdE, kompreneble laŭ propra elekto de ĉiu kontribuonto al la raporto.

Bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn al Christer dum la unuaj tri semajnoj de januaro 2016, do dum la periodo 2016-01-01—2016-01-21. Li kunmetos ilin en libreto publikigota kiel eble plej frue en 2016 (eble en la serio *Oficialaj informoj*). Ĉiuokaze ĝi estu preta en Nitro.

22. La libroprojekto *Aliroj al esperanto*

La estraro de Akademio de Esperanto planas eldoni libron, kiu prezentos multajn aspektojn de la fenomeno esperanto. Momente la projekto resumeblas tiel:

22.1. Ĉapitroj jam promesitaj

- ★ Christer Kiselman (antaŭparolo)
- ★ Detlev Blanke (interlingvistika aliro)
- ★ Otto Prytz (gramatika aliro; unua skizo ricevita)
- ★ Renato Corsetti kaj Hiroshi Nagata (psikolingvistika aliro; ĉapitro jam ricevita)
- ★ Carlo Minnaja (literaturo)
- ★ Probal Dasgupta
- ★ Jouko Lindstedt
- ★ Federico Gobbo (lingvoinventa aliro)
- ★ Sabine Fiedler (frazologio; ĉapitro jam ricevita)
- ★ Marc van Oostendorp (lingvofilozofia aliro)
- ★ Kimura Goro Christoph (lingvosociologia aŭ makrosociolingvistika aliro)
- ★ Humphrey Tonkin (movadhistoria aliro)
- ★ Aleksandro Melnikov (lingvokulturologia aliro)
- ★ Orlando E. Raola (hedonisma aliro, dediĉe al Claude Piron, inventinto de la ideo de La Bona Lingvo)
- ★ Ilona Koutny

Espereble venos pliaj kontribuaĵoj. La ordo ĉi tie estas laŭ alveno de la promesoj; ĝi ne nepre estos la ordo en la publikigaĵo.

22.2. Gvidlinioj por la verkado de kontribuaĵoj

- ★ *Librotitolo*: *Aliroj al esperanto* (provizora titolo, sed eble la ĝis nun plej bona).
- ★ *Celo*: Montri al vasta grupo de esperantoparolantoj la riĉecon de esperanto el lingva, kultura, psikologia, socia, lerna, literatura, . . . , vidpunktoj.
- ★ *Redakta komitato*: La estraro (do Christer, Probal, Brian kaj Renato).

★ *Amplekso de ĉiu ĉapitro*: Normale minimume 10 paĝoj A4, 12 punktoj. Se la temo estas tre interesa, ĝis 15 paĝoj. Se eksterordinare interesa aŭ kompleksa temo, ĝis 20 paĝoj.

★ *Bibliografio*: Bonvolu sekvi, almenaŭ plejparte, la konsilojn en *Unified Style Sheet for Linguistics*, facile trovebla en la reto. Bibliografia donitaĵo do estu:

Familia nomo, individua nomo. Jaro. Titolo. Eldonloko: Eldonejo.

Kelkfoje sen komo:

Familia nomo individua nomo. Jaro. Titolo. Eldonloko: Eldonejo.

Ekzemple kaj Benczik Vilmos kaj Benczik, Vilmos povas okazi. Antaŭe estis Liu Haitao; nun li volas esti Liu, Haitao.

★ *Limdato*: Ĉar la invito estis dissendita antaŭ longe, kaj ĉar granda plimulto de la verkontoj jam delonge akceptis kontribui, ni esperas ricevi viajn kontribuadojn 2015-12-15. Sed por personoj kiuj estas ege okupitaj, ni metu la tagon 2016-03-31 kiel lastan, finan, limdaton por la ricevo de kontribuadoj.

★ *Kompostado*: L^AT_EX, 11 punktoj. Ekstera formato de la libro 155 mm × 234 mm. Formato de la tekst-areo kun supera linio 128 mm × 209 mm. Formato de la tekst-areo sen supera linio 128 mm × 200 mm (t.e. ĉio kiel por EES 5–7). Prefere sendu tekstojn uzante la x-sistemon (*cx* por *ĉ*, *CX* por *Ĉ*), ĉar ĝi estas plej sekure transformebla al fidelaj supersignoj (tegmento sur *c*, *C*: *ĉ*, *Ĉ*; lunarko sur *u*, *U*: *ŭ*, *Ŭ*). (Komputilaj sistemoj ja kapablas trakti la diakritojn, sed ĉiuj laŭ malsamaj kodoj — ili ne bone kunlaboras.) Christer kompostas.

★ *Presado*: Fare de Petro Chrdle ĉe KAVA-PECH laŭ la ĝeneralaj kondiĉoj de EES.

★ *Financado*: Ni petu monon ĉe ESF aŭ aliaj riĉaj organizaĵoj. Se ni ne sukcesos: private kiel por EES.